

2025.9.15 Nepalo

Kara Hori San,

En Nepalo okazis revolucio de gejunuloj, nomata Gen Z. Temas pri la generacio naskiĝinta inter 1990 kaj 2010. La registaro unue subpremis, fakte malpermesis la uzon de sociaj retoj, kaj pro tio la junuloj protestis. Sed malantaŭ tio kuŝis ankaŭ pli profundaj kialoj: la korupta sistemo de la ŝtato, nepotismo, malegaleco.

Bedaŭrinde, la registaro perforte reagis: pli ol dudek junuloj estis mortigitaj. La sekvan tagon, la tuta popolo leviĝis kontraŭ tiu masakro. Oni detruis la parlamentejon, la oficejon de la ĉefministro, kaj multajn aliajn ŝtatajn konstruaĵojn. La junuloj ankaŭ esprimis sian koleron kontraŭ nepotismo, ĉar politikistoj vivas en lukso per la mono de la popolo.

Nun Nepalo havas novan ĉefministron, Shusila Karki, la unua virino en tiu posteno. La situacio iom normaligas sin, sed la lando jam multe perdis. Se vi volas, mi povas rakonti pli detale morgaŭ.

Bharat (Prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio)

2025 年 9 月 15 日 ネパール

ホリさんへ ネパールでは、Z 世代と呼ばれる若者の革命が起こりました。これは 1990 年から 2010 年の間に生まれた世代です。政府はまずソーシャルメディアの使用を抑圧、事実上禁止しました。そのため、若者たちは抗議しました。しかし、その背後には、腐敗した国家体制、縁故主義、不平等といったより根深い理由もありました。

残念ながら、政府は暴力的に反応し、20 人以上の若者が殺害されました。翌日、国民全体がこの虐殺に抗議して蜂起しました。国会議事堂、首相官邸、その他多くの政府機関が破壊されました。若者たちは、政治家が国民のお金で贅沢な暮らしをしていることに憤りを表明しました。今、ネパールにはシュシラ・カルキという女性初の首相が誕生しました。状況は正常化しつつありますが、国はすでに多くのものを失っています。ご希望であれば、明日、この件についてさらに詳しくお話します。

バラート（ネパールエスペラント協会会長）

ネパール首都、若者が暴徒化

全土デモ、閣僚住宅街に 3000-4000 人

ネパール政府が主要な SNS アプリを使えなくしたことに抗議する若者らのデモが拡大して、警察官と衝突し、オリ首相の辞任表明に発展した。首都カトマンズでは9日、怒った若者が暴徒化し、制御不能になっている。

首都に住む朝日新聞の通信員は「若者が外出禁止令を無視して早朝から警察や政府機関に放火している。興奮状態で、誰もコントロールできなくなっている」と語った。

同通信員によると、首都南部バイセパティ地区では、1年ほど前に40億ルピー（約40億円）の公金で建てられたばかりの閣僚用の住宅地に群衆が殺到した。その数は3000-4000人で、軍は閣僚や家族を救出するために、3-4機のヘリコプターを飛ばした。混乱でなかなか着陸できず、警告発砲した。救出が終わり、ヘリが飛び立つと、群衆は家々に放火した。一帯は黒煙に包まれている。

2025.9.10

ネパール首都若者暴徒化

全土デモ 閣僚住宅街に 3000〜4000 人



ネパール政府が主要な SNS アプリを使えなくしたことに抗議する若者らのデモが拡大して警察官と衝突し、オリ首相の辞任表明に発展した。首都カトマンズでは9日、怒った若者が暴徒化し、制御不能になっている。

▼3面参照

首都に住む朝日新聞の通信員は「若者は外出禁止令を無視して早朝から警察や政府機関に放火している。興奮状態で、誰もコントロールできなくなっている」と語った。

同通信員によると、首都南部バイセパティ地区では、1年ほど前に40億ルピー（約40億円）の公金で建てられたばかりの閣僚用の住宅街に群衆が殺到した。その数は3千から4千人。軍は閣僚や家族を救出するため、3〜4機のヘリコプターを飛ばした。混乱でなかなか着

陸できず、警告発砲した。救出が終わり、ヘリが飛び立つと、群衆は家々に放火した。一帯は黒煙に包まれている。

群衆は議会にも入り込み、放火した。SNSに投稿された映像では、巨大な建物全体が黒煙に包まれ、若者らがスマートフォンで撮影しながら、氣勢を上げた。治安部隊は手出しをせず、遠巻きに状況を見ている。

官庁街では2〜3の省庁の建物から火の手が上がった。首相経験者ら政界有力者の自宅も標的になっている。警察は9日、前日のような発砲はせず、部隊の多くは軍とともに駐屯地などに集まっているという。

市内では電気や通信は止まっている。最大の民放テレビ・カンティプルの放送は中断した。襲撃を受けたと報じられている。騒乱状態は首都だけでなく、複数の都市でも起きているという。

（バンコク＝武石英史郎）

群衆は議会にも入り込み、放火した。SNS に投稿された映像では、巨大な建物全体が黒煙に包まれ、若者らがスマートフォンで撮影しながら氣勢を上げた。治安部隊は手出しをせず、遠巻きに状況を見ている。

官庁街では 2-3 の省庁の建物から火の手が上がった。首相経験者ら政界有力者の自宅も標的になっている。警察は 9 日、前日のような発砲はせず、部隊の多くは軍とともに駐屯地などに集まっているという。

市内では電気や通信は止まっていない。最大の民放テレビの放送は中断した。襲撃を受けたと報じられている。騒乱状態は首都だけでなく、複数の都市でも起きているという。

Junuloj tumultas en la ĉefurbo de Nepalo

Tutlandaj manifestacioj, 3.000-4.000 homoj en kabineta loĝejo

Junuloj protestantaj kontraŭ la decido de la nepala registaro bloki aliron al gravaj sociaj amaskomunikilaj aplikaĵoj eskaliĝis, kondukante al kolizioj kun la polico kaj la anonco de la eksiĝo de ĉefministro Oli.

La 9-an, koleraj junuloj transformiĝis en homamason en Katmanduo, kaŭzante nekontroleblan perforton. Asahi Shimbun-korespondanto loĝanta en la ĉefurbo diris: "Junuloj ignoras la elimalpermeson kaj ekbruligas policejojn kaj registarajn konstruaĵojn ekde frua mateno. Ili estas en stato de agitado kaj neniu povas kontroli ilin."

Laŭ la korespondanto, en la suda parto de la ĉefurbo, en la distrikto Baisebati, homamaso de 3.000-4.000 homoj svarmis en la kabinetan loĝejaron, kiu estis konstruita nur antaŭ unu jaro per publikaj financoj valoraj je 4 miliardoj da rupioj (proksimume 4 miliardoj da enoj). La homamaso nombris 3 000-4 000 homojn, kaj la militistaro flugigis tri aŭ kvar helikopterojn por savi la ministrojn kaj iliajn familiojn. La kaoso malfaciligis ilian surteriĝon, do avertaj pafoj estis lanĉitaj.

Post kiam la savo finiĝis kaj la helikopteroj ekflugis, la homamaso ekbruligis domojn. La areo estis kovrita de nigra fumo. La homamaso ankaŭ eniris la parlamentejon kaj ekbruligis ĝin. Filmaĵoj publikigitaj en sociaj retoj montris la tutan grandegan konstruaĵon kovritan de nigra fumo, kun junuloj kriegantaj ĉantojn kaj filmantaj per siaj poŝtelefonoj.

Sekurecaj taĉmentoj ne intervenis, sed observis la situacion de malproksime. En la registara distrikto, flamoj ekis en du aŭ tri ministeriaj konstruaĵoj. La hejmoj de eminentaj politikistoj, inkluzive de iama ĉefministro, ankaŭ estis celitaj. La polico ne ekpafis la 9-an kiel ili faris la antaŭan tagon, kaj multaj el iliaj soldatoj laŭdire kolektiĝas en garnizonoj kaj aliaj lokoj kune kun la militistaro. Elektro kaj komunikadoj restas neatingeblaj en la urbo. La plej granda komerca televidstacio estis fortranĉita de elsendoj kaj laŭdire estis atakita. Laŭdire la tumulto ne limiĝas al la ĉefurbo, sed okazas ankaŭ en pluraj aliaj urboj.

2025.8.16 Nepalo

Kara Hori-san, (saluton ankaŭ al ĉiuj aliaj)

Vi eble memoras la frustritan leteron, kiun mi sendis al vi antaŭ du aŭ tri semajnoj. Tiam mi skribis, ke la junularo ne plu vidas estontecon en nia lando, kaj pro tio ĝi ne interesiĝas lerni nian lingvon. Tio ne okazas nur en Nepalo; mi certas, ke la sama situacio validas por la tuta Sudazio. En la regiono, nur Nepalo havis fortan movadon, sed ankaŭ ni nun ĉiam pli malfortiĝas, kaj ni, movadanoj, perdas tempon sen vera progreso. Tio signifas, ke ne nur Nepalo, sed la tuta Sudazio frontas seriozajn ekonomiajn kaj kulturajn problemojn. Tion mi jam skribis al vi, kaj sur tiu bazo fine okazis la revolucio de la junuloj.

La nuna politika kaj socia situacio en Nepalo estas tre malbona. La popolo jam de longe ne kontentiĝis pri la politikaj partioj. Malmultaj homoj, proksimaj al la tri grandaj partioj, ĉiam profitis, dum la ceteraj devis suferi. La korupto estis tiel radikiĝinta, ke la leĝoj neniam atingis la respondeculojn, kaj la pli malsuperaj tavoloj ne povis stari kontraŭ ili. La politikistoj sin prezentis sub la masko de demokratio, kvankam ili mem iam venis el revolucio kaj poste ekspluatis la popolon nome de revolucio. Iliaj gefiloj vivas en lukso en Usono kaj aliaj landoj, dum la ordinara junuloj devas labori en la varmegaj arabaj landoj por sendi hejmen fremdan monon.

En la ŝtato regis nepotismo, nur membroj aŭ proksimuloj de la partioj povis ricevi gravajn postenojn. Ekzemple, ambasadoro devis esti elektita de la partio, ne surbaze de merito. Ankaŭ la elektoj estis aĉetitaj, kandidatoj devis pagi grandajn sumojn por gajni postenojn, kaj poste repreni tiun monon per korupto. Dum la lastaj 15 jaroj nur tri personoj vicvice fariĝis ĉefministroj, kaj ŝajnis, ke tio daŭros senfine. Intertempe oni misuzis buĝetojn por konstrui vojoj, pontoj kaj aliaj projektoj.

La popolo observis la revoluciojn en Sri-Lanko kaj poste en Bangladeŝo, kaj atendis sian momenton. Do la nun okazinta ribelo en Nepalo ne estis neatendita, oni antaŭvidis ĝin. Eĉ grupoj proksimaj al la eksa reĝo provis, sed malsukcesis. La partiestroj tamen neniam imagis, ke la popolo vere leviĝos kontraŭ ili.

Fine okazis la Revolucio de la Generacio Z. Temas pri generacio naskiĝinta inter 1990 kaj 2010 (do inter 13 kaj 28 jaroj). La registaro komence provis subpremi perforte, mortigante pli ol dudek junulojn. La protesto, kiu komenciĝis la 7an de septembro, eksplodis pro la decido de la registaro, kiu la 4an de septembro malpermesis 23 sociajn retojn, inter ili Facebook, Instagram kaj aliaj. Tiuj retoj estis ne nur fonto de laboro por multaj junuloj, sed ankaŭ loko por esprimi sin. La veraj postuloj tamen estis forigo de korupto, nepotismo kaj malegaleco.

La junuloj havis sloganon: “La gefiloj de politikistoj vojaĝas en luksaj aŭtoj, dum la gefiloj de la popolo laboras sub la suno en la arabaj landoj.” La profunda kaŭzo estis ĝenerala kolero kontraŭ la tuta sistemo.

Bedaŭrinde, la registaro reagis per masakro. Post la murdo de junuloj, la 8an de septembro la tuta popolo eliris al la stratoj. Malgraŭ militista ordono, oni detruis la parlamentejon, la oficejon de la ĉefministro kaj multajn aliajn ŝtatajn konstruaĵojn. Oni ankaŭ bruligis la domojn de politikistoj, kie oni trovis amasojn da kaŝita mono. Firmaoj de komercistoj, kiuj profitis el korupto, same estis atakitaj.

La nombro de mortintoj ĝis nun atingis ĉirkaŭ 75, kaj ĝi daŭre kreskas pro la severaj vundoj. Eĉ la prezidanto devis malaperi dum kelkaj tagoj. La tiama ĉefministro kaj la ministroj ankoraŭ restas kaŝitaj. En la vespero de la 8a, je la 22a horo, la Nepala Armeo transprenis respondecon pri paco.

Nun la Gen Z-movado jam nomumis novan ĉefministron kaj tri aliajn ministrojn. Unuafoje en la historio de Nepalo virino fariĝis ĉefministro: Sushila Karki, eksa ĉefjuĝistino de la Supera Kortumo. La junuloj rapide purigis la stratojn, sed la damaĝoj pro la bruligitaj konstruaĵoj restos dum jaroj. Multaj gravaj dokumentoj de la registaro kaj kortumoj pereis. Oni povas diri, ke Nepalo nun komencas preskaŭ de nulo.

Kvankam la situacio iom normalas, la lando jam multe perdis. Ni, esperantistoj, tamen provas rigardi la estontecon kun espero. Mi pensas tamen, ke la venontaj jaroj ne estos facilaj, certe sekvos novaj konfliktoj. Nepalo devas komenci denove de la fundamento. Ĉar la plimulto de dokumentoj neniam estis ciferecigitaj, la ŝtato frontos grandajn malfacilaĵojn. Mi timas, ke la nova registaro perdiĝos en la nebulo de nia lando. Sed la junuloj tamen havas grandan esperon.

Kiam samideanoj demandas min pri la situacio en Nepalo, mi nun respondas tiel: la vivo de ordinaraĵoj restas simila kiel antaŭe. Povas esti, ke venos eĉ pli malfacilaj tempoj. Mi mem ne posedas aŭton, ne uzas luksajn aferojn. Mi loĝas simple en mia hejmo kaj manĝas tre modeste. Mi kredas, ke tiel vivas ĉirkaŭ 80% de la nepala popolo. Sed la vera problemo aperos poste. Momente homoj eble sentas sin pli liberaj, ĉar ili ne plu timas la tujajn terurajn premojn de la politikaj partioj.

Mi ne dubas, ke tiu influo atingos ankaŭ niajn najbarajn landojn, ĉar ni mem inspiriĝis de Sri-Lanko kaj Bangladeŝo; tial ili devas lerni el nia ekzemplo kaj respondi al la bezonoj de sia popolo.

Kore,

Bharat Kumar Ghimire

Prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio

P.S. Vi rajtas demandi pliajn demandojn, se vi volas scii pli. Mi precize skribis al s-roj Hori kaj Kalle, ĉar ili petis mian raporton, tamen mi informas vin ĉiujn komune.

堀様（他の皆様にも）

2、3 週間前に送った、不満を込めた手紙を覚えていらっしゃるかもしれません。その時、私は若者たちがもはや我が国に将来を見出せず、それが私たちの言語エスペラントを学ぶことに興味を示さない理由だと書きました。これはネパールに限ったことではありません。南アジア全体にも同じ状況が当てはまると確信しています。この地域では、かつてはネパールだけが強力な運動を誇っていましたが、私たち自身も今やますます弱体化しており、運動に参加している私たちは、真の進歩を遂げることなく時間を無駄にしています。これは、ネパールだけでなく、南アジア全体が深刻な経済的・文化的問題に直面していることを意味します。この件については既にお手紙をお送りしましたが、まさにこの状況を踏まえて、若者の革命がようやく実現したのです。

ネパールの現在の政治・社会状況は非常に悪いです。人々は長い間、政党に不満を抱いてきました。三大政党に近い少数の人々が常に恩恵を受け、残り的人々は苦しんでいました。腐敗があまりにも根深く、法律は権力者に届かず、下層階級は彼らに抵抗することができませんでした。政治家たちは民主主義を装っていましたが、彼ら自身もかつて革命の出身で、革命の名の下に民衆を搾取していました。彼らの子供たちはアメリカやその他の国で贅沢な暮らしをしています。一般の若者は外貨を母国に送金するために暑いアラブ諸国で働かなければなりません。

国では縁故主義が蔓延し、重要な地位に就けるのは政党员か側近だけでした。例えば、大使は実力ではなく党によって選出されました。選挙も買収され、候補者は地位を得るために多額の金を支払い、その後、汚職によってその金を取り戻さなければなりません。過去 15 年間で、連続して首相になったのはわずか 3 人で、この状況は今後も続くかと思われました。その間、予算は道路や橋などの建設に悪用されました。人々はスリランカ、そしてバングラデシュの革命を目の当たりにし、自分たちの機を伺っていました。ですから、ネパールで現在起こっている蜂起は予想外ではなく、予見されていたものでした。前国王に近いグループでさえも蜂起を試みましたが、失敗に終わりました。

しかし、政党の指導者たちは、人々が本当に蜂起するとは想像もしていませんでした。そしてついに、7 世代の革命が起きました。これは 1990 年から 2010 年の間に生まれた世代（つまり、13 歳から 28 歳）を指します。政府は当初、暴力による鎮圧を試み、20 人以上の若者を殺害しました。9 月 7 日に始まった抗議活動は、政府が 9 月 4 日に Facebook、Instagram などを含む 23 のソーシャルネットワークを禁止した決定によって爆発的に拡大しました。これらのネットワークは多くの若者にとって仕事の源泉であるだけでなく、自己表現の場でもありました。

しかし、真の要求は、汚職、縁故主義、そして不平等の根絶でした。若者たちは「政治家の子供たちは高級車に乗り、庶民の子供たちはアラブ諸国で太陽の下で働いている」というスローガンを掲げていました。根底には、体制全体に対する広範な怒りがありました。

残念ながら、政府は虐殺で対応しました。若者の殺害後、9 月 8 日、全国民が街頭に繰り出しました。軍の命令にもかかわらず、国会議事堂、首相官邸、その他多くの政府機関が破壊されました。政治家の邸宅も焼かれ、大量の隠し金が発見されました。汚職で利益を得ていた実業家の会社も襲撃されました。死者数は約 75 人に達し、重傷者の増加によりさらに増加しています。大統領でさえ数日間姿を消しました。当時の首相と大臣たちは依然として潜伏状態です。

8 日夜 10 時、ネパール軍が平和維持活動の責任を引き継ぎました。現在、ジェネレーション 7 運動はすでに新しい首相と 3 人の大臣を任命しています。ネパール史上初めて、女性が首相に就任しました。最

高裁判所長官を務めたスシラ・カルキ氏です。若者たちはすぐに街路の清掃を行いました。焼け落ちた建物の被害は今後何年も残るでしょう。政府や裁判所の重要な文書の多くが焼失しました。ネパールは今、ほぼゼロからの再出発と言えるでしょう。

状況はある程度正常化していますが、国はすでに多くのものを失っています。私たちエスペランティストは、希望を持って未来を見据えようと努力しています。しかし、これからの時代は容易ではなく、新たな紛争が必ずや起こるでしょう。ネパールは基礎からやり直さなければなりません。ほとんどの文書がデジタル化されていないため、国家は大きな困難に直面するでしょう。新政権が国の霧の中に埋もれてしまうのではないかと懸念しています。

しかし、若者たちは依然として大きな希望を抱いています。同じような考えを持つ人々からネパールの状況について尋ねられると、私はこう答えます。「一般市民の生活は以前と変わりません。さらに困難な時代が来る可能性もあります。」私自身は車も所有しておらず、贅沢品も使いません。私は家で質素に暮らし、食事もごく質素です。ネパール人の約8割がこのような生活を送っていると思います。しかし、本当の問題は後ほど明らかになります。人々は、目先の恐ろしい政治のプレッシャーを恐れなくなったことで、一時的に自由になったと感じるかもしれません。

この影響は近隣諸国にも及ぶと確信しています。なぜなら、私たち自身もスリランカとバングラデシュから刺激を受けたからです。ですから、近隣諸国は私たちの例に学び、国民のニーズに応えなければなりません。

敬具 バラト・クマール・ギミレ ネパール・エスペラント協会会長

追伸：さらに詳しく知りたい場合は、お気軽にご質問ください。堀氏とカレ氏から報告を求められたため、特にお二人に手紙を書きましたが、皆様にも共通してお知らせいたします。